



La unua meto estu 'simia glito'.


Ĉe la situacio de la problemo 1, restas pluraj 'lim-aranĝejoj'. Nigro, kiu havas la 'metrajton', devus rimarki jenan...




Diag. 1 {Nigro tenas 'metrajton'.} N1, kiu nomiĝas 'simia glito'(SARU-SUBERI), eble vi jam scias tion. La meto estas 'metrajton-tenanta', kio signifas, ke Nigro privilegie rajtas fari la 'lim-aranĝon'. Kio estas la sekvanta procedo? Kiom da poentoj valoras la meto?



Diag. 2 Ordinare Blanko respondas per B2, 'diagonaliĝanta tuŝmeto' (KOSUMI-TUKE).




Diag. 3 Sekvante Nigro 'sinretiras' kiel N3, kaj Blanko 'baras' per B4.




Diag. 4 Kaj ĝusta estas N5.


{paĝo 12 de la originalo}




Diag. 5 Blanko 'efikigas' B6 kaj 'sinligas' kiel B8. Ĉe la situacio de la problemo 1, la unua 'lim-aranĝa procedo' finiĝas ĉi tiam.




Diag. 6 {Ankaŭ eblas B2.} En ĉi tiu kazo, 'alternative' Blanko ankaŭ povas respondi per B2.



Diag. 7 Kompreneblaj estas N3 kaj N5. Sekvante blanko devus tuŝ-meti kiel B6, kaj Nigro 'forkaptas' unu ŝtonon per N7.




Diag. 8 Sekvante procedas ĝis B10. Komparante ĉi tiu rezulton al tio de diag. 5, ne estas gajno/malgajno. Blanka formo estas sama. Nigra formo en diagramo 8 havas nigran ŝtonon sur punkton 'a' en diagramo 5, sed anstataŭe Nigro havas unu 'kaptiton'.




Diag. 9 Anstataŭ N7 en diagramo 7, la meto 'forkaptanta' unu ŝtonon, se Nigro eliras kiel N1, procedas kiel B1, N3, kaj...


{paĝo 13 de la originalo}




Diag. 10 Blanko 'minacas' per B4, kaj Nigro 'sinligas' kiel N5. Ĉi tiam Blanko povas forlasi ĉi tion, kaj akiri 'metrajton'. Ĉe la formo, Blanka teritorio malmultiĝas je unu poento ol tio en diagramo 8. Sed kompanse al tio, tro malgajnome por Nigro estas perdi la 'metrajton'. Ĉi tie, Nigro nepre sinligu kiel N9 en diagramo 8 kaj, tenu la 'metrajton'.




Diag. 11 {Ankaŭ eblas B2} Post N1, Blanko povas respondi kiel B2, kvankam la formo ŝajnas stulta.



Diag. 12 Procedas de N3 ĝis B6, kaj la formo estas sama al diagramo 7.




Diag. 13 {Malbone} Malbone estas 'tuŝmeto' B2 kontraŭ N1. Kial?




Diag.14 Procedas ĉi tiel...

{paĝo 14 de la originalo}



Diag. 15 Sekvante se Blanko 'baras' per B-a, Nigro 'tranĉos' kiel N6 kaj komencos 'alterne-kaptadon (KOU)' celante detruji la blankan teritorion. Do Blanko devus cedi kiel B6.



Diag. 16 Konklude procedas ĝis B12, kaj ĉe la formo, Blanka teritorio malmultiĝas ol tio en diagramo 8 je du poentoj, aliflanke Nigra teritorio ne pli/malmultiĝas. Ofte troviĝas amatoroj kiu ŝtonmetas kiel B2 en diagramo 13. Nepre memoru, ke ĉi tio estas malbona.